



Sennacieca Revuo 134-135

Homaj rajtoj kaj precipe laboristaj rajtoj estas nia afero. Ni uzas kaj propragandas uzadon de Esperanto kiel internacia komunikilo inter ĉiuj progresemaj kaj liberpensemaj homoj.

- * ĈU ESPERANTO POVAS SAVI LA “KULTURAN DIVERSECON”?
- * RESPEKTU LA SOVAĜULON!
- * INFERA BIBLIOTEKO
- * SANO KAJ LABORO
- * LA RAJTO DE ISRAELO ESTI RASISMA
- * BOMBO EN MIA SAKETO
- * INDIĜENAJ KAJ KILOMBANAJ BATALO EN BRAZILO
- * LA VIVULDIVERSECO
- * CEZAR POEMOJ

SENNACIECA REVUO ESTAS ELDONO DE SAT 67, AV. GAMBETTA, FR - 75020 PARIS

Supplément au N° 7/8 (1225/6) de Sennaciulo

Sennacieca Revuo



Denove aperas Sennacieca Revuo de SAT. Estas versajne por la lasta fojo ke mi faris la enpaŝigan laboron, ĉar kiel decide dum SAT-Kongreso en 2006, la eldonoj de SAT nun okazas sub kontrolo kaj laboro de plena skipo da kunlaborantoj.

Povas esti ke entute estas la lasta Sennacieca Revuo kiu aperas. Dum nia Kongreso en Parizo ni decidis ĉu eble ne pli bonas ke nia monata revuo 'Sennaciulo' ricevu plifortigon, ŝanĝu aperritmon al dumonata revuo sed nur kondiĉe ke la ĝenerala enhavo estu ne nur alloga al membroj de SAT sed al ĉiuj legantoj de interesaj tekstoj en Esperanto.

SAT neriame timis evoluojn. Dank' al niaj debatoj kaj kunvenoj, SAT ĉiam sekvis la politikajn sed ankaŭ la teknikajn evoluojn en la mondo kaj tiel restis kio ĝi ekde la komenco estis, moderna, avangarda asocio por ĉiuj progresemaj esperantistoj
Jakvo

Enhavo

- ♦ Paĝo 3 Gary Mickle;
- ♦ Ĉu Esperanto povas savi la "kulturan diversecon"?
- ♦ Paĝo 12 Djemil Kessous;
- ♦ Respektu la sovaĝulon
- ♦ Paĝo 16 Zoran Jivković Tradukis Dimitrije Janičić;
- ♦ Infera biblioteko
- ♦ Paĝo 21 Tereza Sabatier;
- ♦ Sano kaj Laboro
- ♦ Paĝo 23 Joseph Massad;
- ♦ La rajto de Israelo esti rasisma
- ♦ Paĝo 27 Charles Bukowski trad: Cezar;
- ♦ Foje povi malstreĉiĝi kiel muso en kaptilo
- ♦ Paĝo 28 Lina Gabrielli;
- ♦ Bombo en mia saketo
- ♦ Paĝo 31 Cezar;
- ♦ Greg vojaĝas balkonien
- ♦ Paĝo 32
- ♦ Indiĝenaj kaj kilombanaj batalo en Brazilo
- ♦ Paĝo 39 Vinko Markov;
- ♦ La vivuldiverseco
- ♦ Paĝo 44 Mandelstam trad: Cezar;

Kunlaboras en la redakta skipo de SAT :

Viola Murasaki; Vito Markov; Vinko Markov;
Djemil Kessous; Gary Mickle; Tonyo Del Barrio,
Cyril Orsingher; José Maria Salguero; Krešimir Barković;
Petro Levy; Jakvo Schram

Sennacieca Revuo estas eldono de SAT
67, av. Gambetta, FR-75020 Paris

Suplemento al n-ro 7/8 (julio-aŭgusto 2007, 1225/6)

ĈU ESPERANTO POVAS SAVI LA “KULTURAN DIVERSECON”?

Dum la 70-aj jaroj ŝoviĝis la politikaj emfazoj de la Esperantomovado (aŭ komunumo, se uzi la nun pli modan terminon) en nova direkto. Konkize dirite, ĝia delonge establita “paco”-motivo estis duarangigita de nova motivo: la konservado de etnaj kulturoj, etnaj lingvoj kaj etnaj identecoj. Tio, kion oni nomas “etnismo”^[1], iĝis ia furoraĵo inter Esperantoparolantoj. La radiko *etn-* mem en tiu tempo eniris la leksikon de Esperanto.

Tiel oni anstataŭigis ne senbazan, kvankam kutime troigitan ideon – ke komuna lingvo ŝlosile gravas por pacigi la mondon – per plene nekredinda. Nun oni diris, ke neŭtrala komuna lingvo, se oni enkondukus ĝin tutmonde, restus benigna en sia rilato al la etnaj kulturoj kaj lingvoj kaj nek damaĝus nek eliminus ilin, kiel la angla aŭ aliaj potencaj lingvoj tion faras. Limigante la rolon de potencaj lingvoj, Esperanto “ŝirmus” aŭ “protektus” la malfortajn lingvojn. Kial tiu ideo populariĝis?

La kialo estas duobla:

- La pacmotivo perdis kredindecon kiel argumento por la tutmonda enkonduko de Esperanto. En la epoko de la Malvarma milito (kaj de la Vjetnama milito), militaj konfliktoj pli ŝajnis radiki en konkurenco de politikaj sistemoj kaj ideologioj ol en la pli frue supozata etna malkonkordo.
- Precipe TEJO-anoj emis akcepti ideon, kiu aspektigus ilin al la ribelemaj samaĝuloj iomete pli radikalaj, dum ĝi ne kaŭzus multe da malakordo en TEJO mem. La etna naciismo estis taŭga tiucele. Tiun politikan mondrigardon oni povis interpreti “kontraŭimperiisme” al maldek-

strema publiko kaj kiel konservativa kaj tradici-orientita afero al dekstrema.

TEJO ekde 1968 alkroĉis sin al la koncepto reklami Esperanton kiel batalilon kontraŭ “kultura imperiismo” kaj “lingva imperiismo”. La tiujara IJK en Tyresö (Svedio) aprobis konatan rezolucion pri ĝuste tiuj temoj, la *Deklaracio de Tyresö*. Poste, dum proksimume jardeko, tiu koncepto populariĝis en la ĝenerala Esperantomovado, t.e. en UEA, kaj en malpli alta grado eĉ en la maldekstrema SAT.

Oni proponis intertempe plurajn hipotezojn por klarigi kiel Esperanto helpus konservi kulturan diversecon (kiun oni tro simplige egaligas al *etna* kultura diverseco), etnajn kulturojn kaj endanĝerigitajn lingvojn. Ili ĉiuj rilatas al efikoj, kiujn ĝi laŭdire havus, se ĝi efektive “finvenkus” kaj iĝus “ĉies dua lingvo”.

ESPERANTO KAJ NACIISMO FRUEPOKE

Jam en la unuaj jardekoj de Esperanto troviĝis tie kaj tie pretecoj ĝin je la servo de naciismaj celadoj. Instigite de la kataluna aganto Frederic Pujulà i Vallès^[2], la *Unió Catalanista* en 1905 alprenis decidon estonte uzi Esperanton en siaj rilatoj kun aliaj naciismaj movadoj. La irlanda socialisto kaj naciisto James Connolly^[3], kiu jam en 1899 esprimis sin favore al internacia lingvo kaj en la unuaj jaroj de la 20-a jarcento lernis Esperanton, klarigis en 1908, ke la enkonduko de internacia lingvo, kvankam finfine neevitebla, ne estus akcelita, se malgrandaj nacioj pretus foroferi sian

lingvon. Male, ĝi prokrastiĝus pro la tiukaze intensiĝanta lukto inter la lingvoj de la grandaj potencoj. Li aldonis, ke multaj malgrandaj, lingve diversaj komunumoj pli verŝajne interkonsentus pri internacia lingvo ol malmultaj grandaj imperioj. Lingva diverseco tiel utilas al la afero de internacia lingvo. Eblas konjekti, ke la lingvo, pri kiu li pensis, estis Esperanto.

Tuj antaŭ la komenco de la Unua mondmilito, en majo 1914, la *Germana Esperantisto*, organo de la Germana Esperanto-Asocio (GEA), raportis^[4] pri tio, kiel GEA-ano, Franz Goldbach, defendis Esperanton kontraŭ atako de la dekstra naciisto von Pfister-Schweighusen. Tiu opiniis Esperanton minaco al la germanaj lingvoj kaj kulturo, argumentante, ke ĝia enkonduko malfermos la kluvojn al la “plej terura fremdvortismo” kaj malengaĝus la germanan lingvon de la kavalireca rivalado, kiu laŭ li regas inter la dominantaj lingvoj de la mondo. La rebato verkita de esperantisto restis ene de la naciisma pensoskemo. “Ĉu la kontraŭuloj de la ideo de helplingvo ne pretas rimarki, ke precipe la germanoj pli ol aliaj emas asimili eksterlandajn ecojn, kaj ke tiu tendenco eĉ pli elstariĝas, kiam oni akcelas la lingvojn de fremdaj popoloj? Ĉu ili ne scias, ke multnombraj homoj havas nek tempon, monon aŭ talenton por lerni unu el la malfacilaj naturaj fremdaj lingvoj sufiĉe ĝisfunde por kontentigi sian bezonon je internaciaj kontaktoj? Kaj ĉu ili ne finfine povas imagi, ke oni povas esti entuziasma esperantisto kaj samtempe plenigita per arda amo al la patrujo kaj al la kara gepatra